

STARTO

N-ro 3/2017 (264)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



foto Matěj Nárožný

Seminarianoj en la pola Duszniki vizitis grupen nian muzeon

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, pri informadiko (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Jarmila Čejková, Malý Koloredov 1538, 738 01 Frýdek-Místek, jarkacejkova@centrum.cz - sufičas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gyidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Kasisto: Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datumado, kontado)

Komitatano: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Esperanto-Muzeo en Svitavy, rilatoj al la urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, ĉefredaktoro de la asocia retejo kaj de asociaj retkomunikoj, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, chrdle@kavapech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle (kontaktojn rigardu en la antaŭa alineo).

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz

www.muzeum.esperanto.cz

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Polnický

La 102a UNIVERSALA-KONGRESO

22-29.7. 2017

La duan fojon la UK okazis en Seulo, ĉefurbo de Suda Koreio. La prestiĝa evento disvolviĝis fine de julio en Hankuk Fremdlingva Universitato. Kolektiĝis 1174 geesperantistoj el 61 landoj de ĉiuj mondopartoj allogataj de la azia kulturo. Novuloj spertis esperantistan etoson kaj ĝuis interesajn momentojn en amika rondo.



En la ĉirkaŭaĵo de la Universitato flirtis E-flagoj anoncantaj la eventon. Koreaj samideanoj produktis amason da belegaj afiŝoj kaj banderoloj por diversaj Esperanto-okazaĵoj. Dum la daŭro de la kongreso ili konstante kaj pasie laboris por nia bonfarto.



La inaŭgurtago bonvenigis nin pluve. Tamen tio ne malhelpis entu-

ziasman renkonton kun malnovaj kaj novaj geamikoj. En la enirhalo la kongresanoj povis admiri kelkajn ekspoziciojn: fotoj el pasintaj kongresoj, pri L. L. Zamenhof, pri Esperanto kaj admirinde belaj estis ventumiloj. Eblis sin vesti kaj fotiĝi en reĝaj kostumoj.

La kongreso konsistis el la kutimaj programeroj de movada foiro, kleriga lundo, tago de lernado, merkredaj tuttagaj ekskursoj, junulara programo, komitata forumo, strategio kaj kunsidoj, traktado de la kongresa temo, kiu ĉi-foje estis: "Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo".

Okazis IKU-AIS sesioj, lingvaj kursoj kaj KER ekzamenoj, kunvenoj de diversaj asocioj, SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda), KAEM (Komisiono pri Azia Esperanto-Movado), LIBE (Ligo Internaciaj de Blindaj Esperantistoj), IKUE-KELI, (kristanaj organizoj) ISAE (sciencistoj) IKEF (komercistoj), IEJA (juristoj), TEĴA (ĵurnalistoj), IKEK (komunistoj), TADEN (nefumantoj) kaj aliaj.

Kunvenis ankaŭ legantoj de Esperanto, ateistoj, Akademio de Esperanto, Afrika-, Oomoto- kaj ŭonbulismo movadoj. Okazis multaj aliaj interesaj programeroj, inter kiuj pluraj prelegoj pri Koreio, Aŭtoraj duonhoroj, Oratora kaj Belartaj konkursoj, Aŭkciado. Ne mankis komuna fotado, urba akcepto, bankedo kaj kongresa balo, kiun animis la litova grupo Asorti.

Ĉi-foje ne okazis strikta kontrolo ĉe enirpordoj al la diversaj okazaĵoj. Ankaŭ neniu estis priŝtelita laŭ mia scio. La kongresanoj povis manĝi je modestaj prezroj en studenta manĝejo.

Enkondukiĝis nova programero Korea Kulturĉambro, kie ni povis gustumi korean teon, mem ornamiventumilojn per sekigitaj floretoj, lerni danci kaj sekvi prezentojn de korea folklorkulturo.

Ekster la programo okazis Internacia Pontkunveno en la Parlamentejo pri la Unuiĝo de la korea Duoninsulo, kiun ĉeestis 130 personoj el 21 landoj.

Estis elektitaj du Honoraj membroj de UEA kaj disdonataj diplomoj pro elstaraj agadoj, Oratora kaj Belartaj konkursoj, premio Deguĉi, atestiloj pro 50- kaj 40- jaraj membriĝoj en UEA. Estis eldonita poŝtmarko kun portreto de L.L. Zamenhof kaj serio da belaj bildkartoj.

Kongresa Kuriero "La Kandellumo verda" anoncis ĉiujn novaĵojn, ŝanĝojn en la programo, impresojn de partoprenantoj, en la listo aperis novaliĝintoj ktp. Kiel ĉiam, ampleksa estis la libroservo.

Gaja surstrata manifestacio kun tamburado sin direktis al loko, kie okazis la futbalmatĉo, en kiu unuafaje gajnis la esperantista teamo je granda ĝojo de ni ĉiuj.

Pluraj ĉiutagaj ekskursoj ebligis ekkoni la naturon de Koreio, kiu konsistas el maro, montoj, riveroj, kampoj, vilaĝoj, urboj kaj urbegoj, palacoj, ĝardenoj, temploj kaj aliaj diversaj kulturaĵoj de jarmila historio.

Dum vesperaj kulturaj programeroj prezentis koncertojn Kajto, Asorti, Ĵomart kaj Nataŝa, Eruda Li kaj Maju. La teatraĵon "El la vivo de insektoj", prezentis la ĉeĥa ensemblo DOMA. La trupo Espera Mondo prezentis koreajn tradiciajn artojn. Dum la Nacia vespero prezentiĝis la simfonia orkestro Arirang kaj ni povis spekti diversajn admirindajn programerojn. Ankaŭ la Internacia Arta kaj Azia vesperoj estis mirigaj.

En la fermo de la Universala Kongreso ni eksciis pri la venontaj kongresuroj. En la jaro 2019 la kongreso okazos en Lahti, Finnlando kaj en 2020 en Montrealo, Kanado. La venontjara UK disvolviĝos en Portugalio, en ĝia ĉefurbo Lisbono de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2018.

Bonetosa estis la fermo de la kongreso al kiu kontribuis la nederlanda grupo Kajto. Laste prezentiĝis infanoj el la Infana Kongreseto, kiuj venis saluti nin en rekorde granda nombro.



Ĉiuj, kiuj povis partopreni la ĉi-jarajn kongresojn en Koreio devas senti sin feliĉaj. Koreaj sindonemaj kaj laboremaj samideanoj ne seniluziigis nin pri la pasintjare promesita grandioza kongreso kun surprizoj. Ni plene ĝuis ilian gastamon en amikeca harmonio.

Liba Gabalda

REZOLUCIO de la 102-a UK de Esperanto en Seulo

Ni, 1174 partoprenantoj en la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 61 landoj de ĉiuj mondopartoj al Seulo, Koreio,

Volante kontribui

al la laboroj por la Internacia Jaro de Daŭripova Turismo por Evoluigo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj (UN) por 2017,

Diskutinte

la temon "Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo" en pluraj sesioj kaj el multaj vidpunktoj tra la kongresa semajno,

Konstatante

la gravecon de daŭripova turismo por la tutmonda Esperanto-lingvokomunumo, kies anoj ofte vojaĝas por renkonti unu la alian kaj por ekkoni la riĉecon de aliaj kulturoj,

Emfazante

la esencan rolon kiun ludas komuna lingvokono en la perado de reciprokaj kontaktoj inter homoj de malsamaj kulturoj, kaj la unikajn kontribuojn de Esperanto sur tiu kampo;

Asertas

la urĝecon redukti la ekologiajn kaj sociajn damaĝojn, kiujn kaŭzas multaj formoj de turismo, kaj disvolvi novajn kaj pli daŭripovajn formojn;

Invitas

aktivulojn pri daŭripova turismo konsciiĝi pri la grandaj avantaĝoj de komuna neŭtrala lingvo por la kultivado de respondecaj kaj reciprokaj rilatoj inter turistoj kaj gastigantoj;

Konfirmas

la volon de nia movado daŭre labori por aktive engaĝi, eduki kaj inspiri homojn en ĉiuj landoj al pli inkluziva kaj konscia turisma kulturo.

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2017

BRANĈO POEZIO

Unua premio al **Nicolau Dols**, Hispanio, pro "Pasio. Poemo en ses stacioj".

Dua premio al **Jesper Lykke Jacobsen**, Francio, pro "Kosmogonio".

Tria premio al **Lode Van de Velde**, Belgio, pro "Nebulo".

BRANĈO PROZO

Unua premio ne aljuĝita.

Dua premio al **Ewa Grochowska**, Francio, pro "La neĝero".

Tria premio al **Laure Patas d'Illiers**, Francio, pro "En tiu ĉi bela tago".

Honora mencio al **Carys Goldy**, Britio, pro "Tri vortoj".

BRANĈO TEATRAĴO

Unua premio ne aljuĝita

Dua premio ne aljuĝita

Tria premio al **Amir Naor**, Israelo, pro "Amo ne serĉas, amo trovas".

Honora mencio al **Ewa Grochowska**, Francio, pro "Stranga renkontiĝo".

BRANĈO ESEO

Unua premio – premio Luigi Minnaja – ne aljuĝita.

Dua premio al **Roberto Lloancy**, Francio, pro "Kverelo sur Olimpo".

Tria premio al **Javier Alcalde**, Hispanio, pro "Pli bona ol la homa estaĵo? Esperanto kaj transhomismo".

Honora mencio al **Javier Alcalde**, Hispanio, pro "La Esperantisto de la jaro (1887-1997)".

INFANLIBRO DE LA JARO

Eldonejo **Graine de Moutard**, Francio, pro "La sekreto de la strigo de Diĵono".

UEA DIPLOMIS

En la Solena Fermo de la 102-a Universala Kongreso en Seulo estis anoncitaj la nomoj de 8 ricevantoj de Diplomo pri Elstara Agado kaj de Diplomo pri Elstara Arta Agado. Tiuj diplomoj estas aljuĝataj de la Estraro de UEA ekde la jaro 2007. Jen la ĉi-jaraj distingitoj:

Normand FLEURY (Kanado)

Motora de la kebekia movado dum pli ol tridek jaroj, ĉeforganizanto interalie de la Internacia Junulara Kongreso en 1992 kaj la Tutamerika Kongreso de Esperanto en 2008.

Ronald GLOSSOP (Usono)

Profesoro pri paco-studoj, dum jardekoj aktiva verkisto kaj preleganto pri la rilatoj inter Esperanto, paco kaj internacia kompreniĝo.

Halina KOMAR (Pollando)

Elstara aktivulo pri informado, i.a. kadre de la ekonomiaj pintkunvenoj en Krynica, la muzikfestivalo Woodstock, la pola parlamento kaj medioj de la t.n. Tria Aĝo.

Jonas MARX (arta, Germanio)

Majstro de repa muzika stilo en Esperanto, kies koncertoj entuziasmigas junan kaj ankaŭ ne tiel junan publikon.

Germian PIRLOT (Belgio)

Aktivulo pri instruado dum multaj jaroj, i.a. efika helpanto por la instruado de Esperanto en Afriko kaj senlaca kompilanto de registro de Esperanto-kursoj tutmonde.

Jérémie SABİYUMVA (Burundo)

Talenta motora de la movado en Burundo, unu el la plej viglaj landaj movadoj en Afriko, kaj aktiva kunlaboranto pri la tutafrika movado.

Eduardo VIVANCOS (Kanado)

Instruisto kaj varbanto por la movado dum ok jardekoj, inkluzive de la plej malfacilaj kondiĉoj en malliberejoj kaj koncentrejoj; ankaŭ aktiva en Sennacieca Asocio Tutmonda.

WANG Minhao (Ĉinio)

Multjara motora de la movado en Ŝanhajo, talenta instruisto kaj ĉeforganizanto de pluraj internaciaj kongresoj inkluzive de Internacia Fervojista Kongreso en 2015.

NOVA HONORA MEMBRO DE UEA

NGUYỄN Xuân Thu (n. 1932), profesie farmaciisto, esperantisto ekde 1957, ĝenerala sekretario de Vjetnama Esperanto-Asocio de 2004 ĝis 2010. Lingve li kontrolis la vjetnamajn versiojn de *Zagreba Metodo* (2006) kaj *Esperanto per rekta metodo* (2008).

Kiel ĝenerala sekretario de VEA gvidis la laborojn por inviti la 97-an UK-on (2012) al Vjetnamio. Lia ĉefverko estas *Granda Esperanto-Vjetnama Vortaro* (2016), kun 10 652 kapvortoj. Krome li tradukis kaj redaktis la Esperanto-version de *Taglibro de Dang Thuy Tram* (2011). Ekde 2013 Nguyễn Xuân Thu estas membro de la Akademio de Esperanto kaj gvidanto de ĝia komisiono pri homaj nomoj.

DU NOVAJ MEMBROJ DE LA HONORA PATRONA KOMITATO

La Honora Patrona Komitato de UEA konsistas el lingvistoj, sciencistoj kaj aliaj eminentuloj, kiuj faris gravajn servojn al la Esperanto-Movado kaj mem parolas kaj verkis en la Internacia Lingvo.

Harald Helfgott (n. 1977, Limo, Peruo) estas monde konata matematikisto, nuntempe Humboldt-profesoro ĉe la Universitato de Göttingen, Germanio. Li estas specialisto pri la teorio de nombroj, sed liaj esploroj ampleksas plurajn aliajn branĉojn de pura matematiko, inkluzive de grupteorio kaj kombinatoriko.

D-ro Helfgott eklernis Esperanton en 1997 pro scienca scivolo. Laŭ lia propra klarigo, renkontinte la koncepton de lingva kapitalo en kurso pri lingvistika antropologio, “mi subite pensis: kio estus la efiko de lingvo, kiun preskaŭ ĉiu povus lerni kun relativa facileco en malmulte da tempo?”

Aŭdinte pri Esperanto, li ekserĉis en la tiama Interreto kaj kun granda surprizo trovis pli ol cent mil paĝojn pri la lingvo, inkluzive de senpaga kurso. “En la sekvintaj jaroj, mi trovis novajn amikojn, legis multajn interesajn tekstojn — unu el miaj preferataj estis volumo de hungara literaturo tradukita en Esperanton — faris mian unuan vojaĝon en Eŭropo kaj travivis home riĉigajn spertojn. Ankoraŭ hodiaŭ, mi sentas grandan plezuron kiam mi renkontas alian esperantiston — io, kio okazas en neatenditaj lokoj kaj momentoj en mia profesia vivo.”

Giorgio Novello (n. 1960, Venecio, Italio) estas nuntempe la ambasadoro de Italio ĉe la registaroj de Norvegio kaj Islando.

De 2002 ĝis 2006 li laboris kiel Unua Konsilisto de la Konstanta Misio de Italio ĉe la Organizo por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, en Vieno. En 2004 li ricevis la titolon de Oficisto de la Ordeno pro Merito de la Itala Respubliko, kaj samjare magistriĝis pri ekonomia historio ĉe la Londona Altlernejo pri Ekonomiko.

Liaj diplomaciaj talentoj, apogitaj de vasta kleroj pri juro, literaturo, ekonomio kaj historio, estis agnoskitaj de la franca registaro per la titolo Kavaliro de la Nacia Ordeno pro Merito (2013), kaj de la norvega registaro per la Granda Kruco de la Reĝa Norvega Ordeno pro Merito (2016).

Ambasadoro Novello eklernis Esperanton en 1974 “dank' al mirinda libro de Alessandro Bausani pri planlingvoj”, kaj aliĝis al la Esperanta Grupo de Padova. Li trairis E-ekzamenojn en Venecio, 1976, kaj Londono, 1993, kie li ankaŭ aktivis en la loka movado. De 2004 ĝis 2006 li estis vic-reprezentanto de UEA ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Vieno. Intersata pri politikaj aspektoj de interlingvistiko kaj lingvoplanado, li estas ano de la germana Gesellschaft für Interlingvistik (GIL) de 2006, verkis kelkajn eseojn pri Esperanto kaj interlingvistiko en italaj revuoj kaj prelegis diversloke pri Esperanto, inkluzive ĉe la Universitato de Parmo, 2015.

laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA

LA 50-a ILEI- KONGRESO EN BUSAN

15-22.7.2017

Meze de julio ILEI malfermis la serion de tri esperantaj kongresoj en Koreio. Post ĝi sekvis la 102-a Uk en Seulo kaj tuj poste la 90-a SAT-kongreso en la apuda urbo Gimpo.

La kongreso de ILEI okazis de la 15-a ĝis la 22-a de julio en la dua plej granda urbo en Koreio Busan, situanta en la suda parto de la lando. Fakte la kongreso estas la unua kun tiu-ĉi nomo. La decido estis prenita pasintjare en *Nyíregyháza*. Antaŭe temis pri ILEI-konferencoj.



La kongreson partoprenis 170 gesam-ideanoj el 21 landoj. La akcepto estis varma, same kiel la lando mem. Ni loĝis en komfortaj ĉambroj de la junulara gastejo *Arpina*. Ĉiuj programeroj okazis en la oka etaĝo de la konstruaĵo. La temo de la ĉi-jara kongreso estis: **Edukado al Respektoplena Turismo**. Ĝi estis plenumita per kelkaj prelegoj kaj kompreneble per ekskursoj al interesaj lokoj.

Sabate, dum la interkona vespero ni gustumis ĉefe aziajn kaj kelkajn alilandajn frandaĵojn. Koreaj esperantistoj dume prezentis belegan folkloran programon kun specifaj dancoj kaj muziko de sia kulturo. Krom variaj prezentadoj

ni ĝuis grupo- kaj masko-dancojn.



Dimanĉe okazis la solena inaŭguro kun ĉeesto de kelkaj reprezentantoj de la urbo Busan. La prezidantino de ILEI, Mireille Grosjean, bonvenigis la kongresanojn. Estis legataj kelkaj bondezirmesaĝoj. Dum la paŭzo ni aŭskultis specialajn koreajn muzikilojn. Sekvis salutoj de reprezentantoj de ĉeestantaj landoj kaj la prezidantino konigis al ni la kongresan temon pri turismo. Post la malfermo de la kongreso ni komune fotiĝis.

Estis enkondukitaj novaj programeroj: *Pedagogia foiro* kaj *Literatura kafejo*. Tiucele estis prezentitaj kelkaj libroj kaj paroladoj pri diversaj temoj. La Nacia vespero mirigis ĉiujn ĉeestantojn. Ni ĝuis variajn prezentadojn de la korea folklorkulturo. Subtila estis *Dongrae* - la gruodanco, konata jam de la unua vespero.



La semajna programo inkluzivis E-kurson por komencantoj gvidatan de Annie

Grete, progresantoj ĝuis viglan kaj amuzan kurson de Sylvain Lelarge kaj la instruistan trejnadon mastris Katalin Kovats. La fidelaj partoprenantoj ricevis atestilon. Ne mankis lernado de la korea lingvo eksprese sub gvido de Park Yongsung (Nema). Kun Mireille ni krozadis tra la lingvoj. Oni diskutis pri la maniero enkonduki Esperanton en lernejojn. Ĝis nun oni vane strebis pri tio. Tamen, ni estas esperantistoj, do ni devas esperi... En aliaj programeroj oni parolis pri gramatikaj tiklaĵoj, pri E-centroj kaj pri privataj projektoj. Komitatanoj plenumis sian laboron dum pluraj kunsidoj kaj ankaŭ estis pritraktita la "Jaro de la Lernanto".



Sur la urba placo, antaŭ la teatro okazis lingva festivalo kun 16 lingvoj inkluzive Esperanton prezentitaj de la kongresanoj. Por la publiko, kiu bedaŭrinde ne abundis, estis aranĝita speciala kultura programo.

Ni spektis kvar filmetojn el filmo-konkurso okaze de la Jaro de la Lernanto. Ni aljuĝis al unu el ili la premion de la publiko. Rilate al la temo pri turismo oni parolis pri la fama mondvojaĝanto kaj verkisto Tibor Sekelj. Marija Beloŝeviĉ parolis pri

pozitivaj kaj negativaj efikoj de turismo. Aurora Bute vestita en bela rumana kostumo parolis pri kulturaj specifaĵoj de Rumanio. Sur prezentitaj bildoj ni povis admiri pentritajn preĝejojn ankaŭ de ekstere. La rumana bluzo inspiris plurajn famajn modistojn.

Kortuŝa estis la rakonto pri "Miljara Animo" (Korea te-bovlo). Rob Moerbeek prezentis la korean literaturon. Interesa estis la ludo "Bafa-Bafa", en kiu temis pri konfronto de du malsamaj kulturoj.

Tre bongusta kaj enhavriĉa estis la kongresa bankedo en urba restoracio. Ĝi kontentigis ĉiujn ĉeestantojn per varia elekto de koreaj specialaj manĝaĵoj.

Al kongresanoj estis proponitaj pluraj duontagaj ekskursoj por malkovri la ĉirkaŭaĵon. Unu el la tuttagaj ekskursoj estis destinita al vizito de la urbocentro de Busan. Alia tuttaga ekskurso celis la regionon de Gyeongju, kie ni vizitis antikvajn tombojn. Unu el ili estis enrigardebla. Sekvis vizito de monaĥejo, kie ni tagmanĝis kaj plonĝis en meditado. Impresa estis vizito al templo Bulguksa, mondheredaĵo de Unesko.

Ĉe la fino de la kongreso estis prezentita la Iberia duoninsulo, kie okazos venontjare la 51-a ILEI-kongreso en la hispana ĉefurbo Madrido de la 21-a ĝis la 28-a de julio. La portugala ĉefurbo Lisbono gastigos la 103-an UK-on tuj poste. Mireille Grosjean prezentis konkludan paroladon pri la kongreso kaj pri la Rezolucio. Sekvis dankoj kaj gratuloj al busanaj esperantistoj, kiuj sukcesis organizi belegan kongreson. Tiele plenumiĝis bondeziroj de urbaj reprezentantoj eldiritaj ĉe la inaŭguro. Ni ĝuis viglan kaj agrablan semajnon.

Liba Gabalda

La 90-a SAT-KONGRESO

29. 7. - 5.8. 2017

Ĉi-jare la unuan fojon, la SAT-kongreso okazis en Azio. Post la impona 102-a UK en Seulo 105 kamaradoj el 16 landoj ĝuis la 90-an SAT-kongreson en apudseula urbo *Gimpo*, proksime de la bordo ĉe la Flava maro. Ĉefe la azianoj havis ŝancon konatiĝi kun alilandanoj, praktiki la lingvon kaj sperti la SAT-etoson. Junaj japanaj partoprenantoj tre aprezis personan kontakton kun esperantistoj el diversaj landoj.



Koreanoj bonvenigis nin per rideto, varma koro, frateco, amikeco kaj malfermitaj brakoj. Ni loĝis en komforta hotelo *Yakam*, kie okazis la antaŭviditaj programeroj. Krome, je dispono al la kongresanoj estis senpaga aliro al kuracaj banakvojoj. Tion pluraj el ni profitis ĝissate.

Ĉe la alveno, post la registriĝo kaj ricevo de la kongresmaterialo ĉiuj partoprenantoj povis elekti (laŭ sia grandeco) verdan T-ĉemizon kun surskribo: "SAT-tutmonda solidareco". La kongresa temo estis: "Demokratio en nuntempa mondo". La semajna programo estis klare afiŝita sur apartaj paneloj kaj ankaŭ la kongreslibro en pli granda formato ol kutime (A4) enhavis ĉiujn necesajn informojn. Sabate dum la interkona vespero prezentiĝis du muzikbandoj de la "Paca agado sur strato".

Dum la malfermo Vinko Markovo donis informojn pri SAT al la novuloj. Post la salutvortoj de PK kaj OKK sekvis salutoj de kelkaj organizoj: Rob Moerbeek salutis nome de UEA, Dieter Rooke nome de komunistoj, Franciska Tubale nome de Radio Melbourne kaj mi nome de fervojistoj. Malantaŭ la hotelo ni fotiĝis ĉe grandega banderolo kun E-slogano "Se ni kune songas kaj praktikas, Alia Mondo Eblas!"

Tuj poste sekvis prelego pri kandelluma revolucio, kiu sukcesis forigi la prezidantaron de Koreio. Posttagmeze en la sama tono daŭris parolado pri: "Multitudoj kaj absoluta demokratio". Interesan sciencfiksan prognozon pri evoluo de Guglo kaj ĝia pasporto prezentis Hiongun KIM. Li kaptis intereson de la aŭskultantoj.

Vespere ni ĝuis belegan folkloran prezentadon de la ensemblo "Espera Mondo". Sonis diversaj, al kelkaj el ni, nekonataj instrumentoj kaj tamburoj. Ĉe la fino ni povis kunkanti la faman kanton *Ariari*, muziki kaj danci kun la bele vestitaj aktoroj. Ĝojo kaj rido invadis ĉiujn ĉeestantojn.

Ekde lundo komenciĝis kutimaj SAT-programeroj: estis prezentitaj agad- kaj jar-raportoj. Okazis diversaj diskutoj, prezento de la konferenco pri unuiĝo de la du koreaj ŝtatoj okazinta dum UK, laborkunsidoj kaj kunvenoj de frakcioj - liberecana, vegetara, komunisto, sennaciista, verdula, liberpensula.

Inter prelegoj elstaris tiu pri "Nuklea akcidento en Fukuŝima" prezentita de Hori Jasuo. Pri antropologio, kartografio kaj koloniismo prelegis Guilherme Fians el Brazilo. "Enrigardon al la korea literaturo" prezentis Rob Moerbeek.

Pri "Koreaj lingvo kaj historio" prelegis Ho Song. Pri "Esperanto kaj klasikaj lingvoj" donis informojn Saïo Escobar. "La rusan revolucion 1917" rememorigis Dieter Rooke. Pri "Pejzaĝo kaj ĝia influo sur nin" kaj belegajn bildojn prezentis Maria Butan el Rumanio. Pri sia domo en Kreto parolis Annie Grente. Pri siaj spertoj rilate al veganismo parolis Paŭlino Gaborit. Pri "La memoro de E-movado" pri Eduardo Vivancos, nuntempe 97-jaraĝa parolis Xavi Alcalde, "Notoj pri monda kapitalismo" skizis Miyazawa Naoto el Japanio. Pri ĉina Tajpeo por Tajvano ni eksciis de Albengo. Pri "Fak-laboro en Fejsbuko" informis Neil Blonstein. Tradukan laborgrupon gvidis Annie Grente. Ege bela ateliero montriĝis pri kreado de mandaloj per sablo. Hori Jasuo muzikis per diversaj malgrandaj muzikiloj akiritaj dum liaj multnombraj vojaĝoj. Ni eksciis pri la eldona fako kooperativa. De Alberto Calienes ni ricevis informojn pri Kubo kaj de Alfonse Waseka pri la Demokratia Respubliko Kongo.



Kulturaj vesperoj estis dediĉitaj al muzikprezentoj, kantoj kun gitaro kaj revoluciaj kantoj. Belan koncerton

prezentis la litova ensemblo "Sepa kaj Asorti". Kun scivolemo ni spektis teatran komedion "La malfermilo" prezentita de Saša Pilipoviĉ kaj Franciska Toubale. Spektinda estis ankaŭ aŭkcio de esperantaĵoj iniciita de Tahira Masako (nomata Masakato). Estis kolektitaj pli ol 300 eŭroj por la SAT-movado. Dum la distra vespero ni ĝuis korean operon *Ariari* de la familio Lee Eunwoo. Japanan Te-ceremonion prezentis Huzimoto Hideko.

Interesaj ekskursoj gvidis nin al diversaj lokoj de la lando. Belega estis tiu al *Buyeo*, kie ni vizitis admirinde ravan lotusan ĝardenon kaj poste muzeon kaj templon. Alia, ne malpli interesa montris la "Pacan observejon", en *Ganghwa* insulo, kie ni estis plej proksime al Norda Koreio, situanta trans la rivero Han. En la samloka muzeo multaj papermesaĝoj atestis pri deziro reunuiĝi. Plie ni vizitis fortikaĵon kaj la plej malnovan templon de Koreio.

La lastan tagon, dum la kvara laborkunsido, estis ellaboritaj kaj prezentitaj Gvidrezolucio kaj Deklaracio. Vespere okazis fermo de la kongreso kun donacoj kaj dankoj pro sindonema laboro fare de la organiza teamo. Ĉe la fino Saša Pilipoviĉ prezentis la venontjaran urbon Kragujevac en Serbio, kie okazos la 91-a SAT-kongreso de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 2018; la OKK transdonis al li la flagon.

La ĉi-jara kongreso estis riĉa el movada, kultura, distra, kaj turisma vidpunktoj. Abundis interesaj prelegoj, konversacioj, belaj momentoj kaj homa interkompreniĝo.


Liba Gabalda

Ĉapek en Seulo

La studenta teatro DOMA el Svitavy prezentis la teatraĵon de fratoj Ĉapek **El la vivo de insektoj** ankaŭ en UK Seulo, marde la 25-an de julio en la salono Hodler.



Korea antologio



Okaze de la universala kongreso la koreaj samideanoj eldonis antologion de koreaj noveloj. La korea literaturo estas malmulte konata ekster sia lando, kvankam ĝi estas riĉa de la antikvaj tempoj.

Futbalmatĉo



Futbalan matĉon de la kongresanoj kontraŭ la loka teamo venkis la kongresanoj 1:0.

UNESKO-kuriero en Esperanto



La Unesko-kuriero aprilo-junio kaj julio-septembro 2017 aperis en Esperanto kaj estas elŝutebla ĉe

http://uea.org/pdf/Unesko-Kuriero_1-2017.pdf
http://uea.org/pdf/Unesko-Kuriero_2-2017.pdf

El la enhavo:

1. Ŝanc-egaleco estas fundamento, Tagordo 2030, Generacio de entreprenistoj, Akva krizo en Angkor, Scienco estas la bazo de socia progreso, Novigaj partneerecoj por nova dinamiko, Vivanta legendo de Jeju, La Korano inter teksto kaj kunteksto, Kio Ne estas ŝario, La referenca verko por nia epoko, Meti afrikan kreivon en la mondan mapon, Kompreni oceanojn, Sporto por la paco, Lukti kaj eviti la radikaliĝon de gejunuloj, Vizito de urslagaj homoj.

2. Etika ĵurnalismo, Falsaj novaĵoj, Evoluigi kritikan menson, Aftenpost kontraŭ Facebook, Amas-financado por savi la amaskomunikilaron, Lumturo danke al la reto, Humaneco, Graveco de patrolandaj rakontoj, La poeto ĉe la koro de la civito, Dawit Isaak, La ŝlosilo de legipovo, Kundividi por lernado.

115 jaroj de EK Praha

En La Progreso 4-5/1927 Fr. Barth publikigis sian rememoron, kiel li iniciatis fondon de la Praga klubo en 1902 kiel 18-jara junulo.

FONDO DE „ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA”.

Daŭrigo de la pasinta numero:

Nia tuta penado celis interesigi por la ideo iun eminentulon; ni faris provon jen tie jen aliloke — ĉiam sensukcese. Hodiaŭ ni alimaniere rigardas tiamajn malsukcesojn kaj eĉ komprenas, ke ne povis esti alimaniere.

Nur hodiaŭ ni ankaŭ vidas, kiel grandega estis laboro kaj kiel valorega estis helpo de sinjoro Theodor Čejka el Bystřice pod Hostýnem, riĉe kaj malavare subtenanta nin per la plej diversaj presaĵoj, kiujn eldonadi ni mem kun niaj rimedoj ne povis kuraĝi eĉ pensi.

Nia sola sukceso estis artikoloj en „Pražský denník“ kaj la rubriko en „Nájemník“. Eble iu demandos, ĉu havas sencon propagandi esperanton inter legantoj de „Pražský denník“, al kiuj nenio estis pli malproksima ol la ideo pri la internacia lingvo. Vere la nombro da demandintoj ne estis granda, tamen ni ĝojis eĉ pro la malmulto. Pli oni povis atendi de la legantoj de „Nájemník“ multe disvastigita en tiu tempo pro siaj teatraj kritikoj. Estas juste konstati, ke ambaŭ gazetoj faris, kion ili povis. La estonto tion taksos, ĉar tiame grandaj kaj provincaj ĵurnaloj estis aŭ malamikaj aŭ indiferentaj. Per tiuj gazetoj malrapide kuniĝadis adresoj de interesantoj, kaj ni povis inviti ilin por kunveni.

Ni kunvokis la unuan kunvenon de la amikoj de lingvo esperanto al la 20 de junio 1902 en la restoracion en „Konvikt“ (Bartolomějská). La programo de la kunveno estis lego kaj prezento de la statuto de la proponata klubo. La redakto de la statuto ne postulis tro da laboro, ĝi estis farita laŭ kutimaj modeloj.

Ni invitis ĉirkaŭe kvindek personojn, sed en „Konvikt“ venis proksimume dek personoj (unu sinjorino), nombro neatendata de ni post ambaŭ spertoj. La statuto estis prezentita por oficiala aprobo kaj oni povis komenci societan agadon. Sed rigardante la someran sezonon ni decidis kunvoki la ĝeneralan fondan (konstitucion) kunvenon nur en la aŭtuno esperante, ke ni ankoraŭ sukcesos gajni novajn partianojn. La intereson ni vidis laŭ tio, ke la librejo de E. Weinfurter (Vodičkova, Praha II.) vendis en Praha proksimume 300 ekzemplerojn de la lernolibro de Čejka. Estas sendube, se la ĵurnaloj estus akceptintaj niajn notizojn, la intereso povis esti pli granda.

La preparojn por fonda kunveno ni kompreneble faris laŭ modesto de niaj financaj rimedoj. Ni dissendis grandan amason da invitoj al individuoj kaj korporacioj, ĉe kiuj ni supozis almenaŭ iometan eblon de la intereso pri la afero, ni bombardis la redakciojn, kaj ni esperis, ke la kunveno estos imponanta. Iu el ni, mi ne memoras kiu, faris belajn afiŝojn por montraj fenestroj de komercejoj, kaj ni faris rondan vojaĝon tra komercejoj de ĉefaj stratoj. La rezultato estis, ke ĉie oni rifuzis la afiŝojn, kvankam ili estis vere belaj, kaj ni petis pendigi ilin por solaj tri tagoj.

Sole librejoj de Topič kaj Weinfurter kaj unu alia komercejo sur la tiama strato

Ferdinandova (nuna Národní) permesis al ni meti nian afiŝon en ilian montran fenestron.

Plua zorgo estis trovi konvenan ĉambbron. La ĉambro en Konvikt, kie ni aranĝis la preparan kunvenon, ŝajnis al ni malgranda, tiu sur la insulo Žofín (Slovanský ostrov) tro multekosta — kaj la nombro da aliaj disponeblaj estis tiame tre malgranda. Fine ni konsentis lui ĉambregon de restoracio „U Štajgrů“ (kie hodiaŭ estas komerca domo de Novák en Vodičkova, Praha II), kiu sufiĉis por 300 — 500 personoj.

Fine la 9. de Novembro 1902 venis tago de la memorinda fonda kunveno de „Esperantista klubo en Praha“. En la granda ĉambrego regis malpleno kaj mallumo, la publiko estis kunvenanta tiel, ke ĉe la komenco prokrastita je unu horo ni kalkulis dek kvin ĉeestantojn, el kiuj du aŭ tri estis nekonataj al ni; la ceteraj 12-13 estis ni, „malnova anaro“. Tiu ĉi malĝoja komenco nature ne povis entuziasmigi nin kaj tial ni senceremonie elektis la unuajn prezidanton kaj komitaton. La unua prezidanto fariĝis S-ro E. Weinfurter, librovendisto (Vodičkova, Praha II.). La elektita komitato tuj kunvenis kaj konstituiĝis jene: viceprezidanto S-ro Fr. Kühnl, sekretario S-ro Fr. Barth, kasisto S-ro J. Görner, protokolisto S-ro Ed. Kühnl, inventaristo S-ro S. K. Neumann, bibliotekisto S-ro F. Vaníček, anstataŭanto F-ino Heintalová. Kiel kunvenejo estis elektita la kafejo „Union“ (en la strato tiame Ferdinandova, nun Národní).

Tiel estis fondita „Esperantista klubo en Praha“. La priskribo de ĝia plua historio ne apartenas en la kadron de tiuj ĉi rememoroj. (*Fino*)

Peter Baláž en Ĉeĥa Televido

Vendrede la 25-an de aŭgusto 2017 ni rememoris 25 jarojn de disdivido de Ĉeĥoslovakio je du memstaraj ŝtatoj, Ĉeĥio kaj Slovakio. La disigon interkonsentis Václav Klaus kaj Vladimír Mečiar en la vilao Tugendhat en Brno. Tial en la vilao okazis pluaj rektaj elsendoj. Inter ili ankaŭ intervjuo kun la slovaka esperantisto Peter Baláž en la vilaa ĝardeno.

Motivo estis la fakto, ke ĉeĥoj, precipe ĉeĥaj infanoj, ĉesas kompreni la slovaklingvon, ĉar en nia televido preskaŭ ne aperas slovakaj filmoj en originalo, dum en Slovakio aperas ĉeĥlingvaj filmoj (eĉ dublitaj el la angla aŭ franca) sufiĉe ofte, tial slovakoj komprenas la ĉeĥan lingvon senprobleme.

Peter Baláž lanĉis plurajn projektojn, ekz. Esperanto-kurson *Lernu!* kaj kursojn de aliaj lingvoj, inter ili ankaŭ la slovakon por ĉeĥoj. Ĝuste tio estis temo de la intervjuo, en kiu aperis mencio eĉ pri Esperanto.

La artikolo kaj intervjuo estas troveblaj en la televido retejo

<http://www.ceskatelevize.cz/ct24/domaci/2221015-slovaci-rozumi-cestine-stale-dobre-cesi-uz-jsou-na-tom-se-slovenstinou-hur>

La artikolo havas titolon: *Slováci rozumí češtině stále dobře. Češi už jsou na tom se slovenštinou hůř.* (Slovakoj komprenas la ĉeĥan ĉiam bone. Ĉeĥoj la slovakon malpli).

-mm-

Esperanto Třebíč

La unua E-kurso okazis en la urbo Třebíč jam en la jaro 1907. En la jaro 1908 post la E-kurso estis fondita E-klubo. Ankoraŭ en la jaro 1909 okazis E-kurso kaj poste la E-klubo sian agadon finis. Kial? Neniu scias.

En la jaro 1928 venis al Třebíč 2 instruistoj-esperantistoj el Brno, Theodor Kilian kaj Karel Sittauer. En Třebíč aliĝis al ili 1 esperantisto, kiu eklernis E-on sole. Estis tio ortodoksa pastro Josef Laixner. Th. Kilian fariĝis profesoro ĉe komerca akademio. Karel Sittauer instruis ĉe burĝa lernejo kaj pli poste en la urbo fianĉiĝis. En la jaro 1934 lia edzino naskis filon Pavel, kiu estis de pastro Laixner baptita ne nur en la ĉeĥa lingvo, sed ankaŭ en Esperanto. Lia baptopatro fariĝis Th. Kilian. Kio okazis pli poste? Karel Sittauer foriris al eksperimenta lernejo de lingvoj de Tomáš Baťa en Zlín, pastro Leixner ankaŭ foriris de Třebíč kaj prof. Kilian komencis labori ĉe Verda Stacio de radio Brno. Por tiu stacio li skribis la 1-an E-ekzercaron, tradukis diversajn teatraĵojn kiel ekzemple de Čapek: Blanka malsano, en kiu li mem kun aktoroj Höger kaj Leraus ankaŭ ludis.

Venis bedaŭrinde la 2-a granda mondmilito kaj la lingvo Esperanto estis fare de germanoj malpermesita. Tuj post la milito okazis en la urbo E-kursoj. Mi partoprenis kiel 13-jarulo la 2-an kurson en la jaro 1947. Ankoraŭ dum la kurso mi kun kelkaj geskoltoj fondis la Skoltan Esperanto-Ligon, kiu en sia komenco havis ĉirkaŭ 30 geskoltojn. Post la E-kurso ĉe komerca akademio estis fondita E-klubo. Ĝia 1-a klubestro fariĝis prof.

Kilian, la sekretario estis Josef Poláček. La klubo vigle laboris. En la jaro 1950 estis fare de komunista registaro likvidita skoltismo en nia tuta respubliko. La laboron devis ĉesigi ankaŭ la Skolta E-Ligo. La geskoltoj tuj transiris al E-klubo kiel Esp. Junularo. Sed tiam al iama SEL aliĝis pluaj geskoltoj. La E-junularo tuj havis ĉirkaŭ 130 membrojn. Sed venis granda problemo. Skoltajn klubejojn ni devis transdoni al la nova organizo Pionýr. Dank' al Dio, ĉiam ekzistis bonaj homoj. Unu patro de nia membro pruntedonis al ni du ĉambretojn, kiujn li ne uzis. Do en la ĉambretoj dum ĉiu tago de semajno okazis kunvenoj de unuopaj grupoj kaj ĉiuj dum la kunvenoj lernis ankaŭ Esperanton.



Ĉiuj lernis bone, ĉar ĉiujn interesas korespondi kun eksterlando. Preskaŭ ĉiuj estintaj geskoltoj volis ankaŭ tendumi! Sed tendumadon la registaro jam en la jaro 1948 malpermesis. Tendumi povis nur tiuj, kiuj pere de tendumado helpis al la ŝtata ekonomio. Mi do iris demandi la kulturalan inspektoron František Sedláček, kiu estis esperantisto. Lia respondo: Esperanto helpas kunigi naciojn! Vi povas tendumi, sed ĉiutage vi devas minimume 2 horojn instrui Esperanton.

Mi do komencis tendaron organizi. Josef Bublán reveninta de soldatservo estis preta tendaron gvidi. Vi devas ĝin nur prepari. La lokon por tendaro mi trovis en golfo ĉe Chvalatice, ĉe valbaraĵo de Vranov. La loko estas bela, trinkebla akvo estas en ĉirkaŭaĵo en malgranda puteto.

Do en la jaro 1952 tuj komence de ferioj, komenciĝis la 1-a etapo de la tendaro. Sed kio okazis pli poste? En la respubliko oni eksciis, ke Třebíč organizas E-tendaron. Ni do ricevis multajn leterojn de interesuloj.



Ĉu ni povas organizi tutŝtatan tendaron? Sed ni ne havas tendojn! Fina rezulto estis: ĉar ne estas tendoj, ni devas la tendaron organizi en tri etapoj. Ni havis nur 16 tendojn, tio signifas, ke ni povis akcepti nur 32 personojn. Do la unua tutŝtata tendaro okazis en la jaro 1955. Kaj kio okazis post la tendaro? Ĉiuj organizantoj estis punitaj! Kial? Ni organizis tutŝtatan aranĝon sen permeso!

Mi kiel studento de gimnazio ricevis 2-an gradon pri konduto kaj 3-an gradon pri la germana lingvo. Kaj tiam mi ankoraŭ regis la germanan pli bone ol la ĉeĥan. Mia anstataŭanto de Junularo Jaris Habeš devis foriri por unu jaro brigadi al uran-minejo en Příbram kaj la

3-a Zdeněk Brož devis labori kiel ministro en Zbýšov ĉe Brno. Min kiel estontan soldaton oni povis puni per malbona opinio. Jaris Habeš reveninta post unu jaro de minejoj, tuj organizas en la jaro 1957 la tendaron. Mi estis reveninta de soldatservo aŭtune en la jaro 1957. Kaj tuj mi iris kontroli nian tendarlokon. Bedaŭrinde sur nia loko iu konstruis kabanon. Ni do trovis la lokon alian ĉe golfo de Lančov. Kaj tie ni organizas la tendarojn ĝis nun. Ĉijare jam po 65-foje. La tendoj jam longe estas estinteco. La nunaj kursanoj jam loĝas en kabanon. Post la velura revolucio ni volis iom helpi al niaj loĝantoj kaj ni komencis krom Esperanto instrui ankaŭ la lingvojn: anglan, germanan, hispanan kaj francan.



Nia E-klubo eldonis por bezono de tendaro diversajn presaĵojn por instruado. Ekzemple la broŝureton ABC de Esperanto, diversajn vortarojn ktp. La klubo ĝemeliĝis kun Klubo en Velingrad en Bulgario. La bulgaroj sendis al nia tendaro ĉiujare minimume 20 gelernantojn, ni vizitadis Bulgarion.

La EK organizas ankaŭ karavanojn. La unua jam longe antaŭ velura revolucio okazis al la regiono de urbo Domažlice

al Díly ĉe Klenčí, kie loĝis instruisto de nia tendaro Vuk Echtner. Ni vizitis ankaŭ la urbon Pardubice kaj ĝian regionon kaj multajn ceterajn regionojn. En la jaro 1989 antaŭ la revolucio ni vizitis nian ĝemelan klubon en Velingrad kaj multajn aliajn vidindaĵojn en Bulgario.



Tuj post la revolucio ni veturis al Vieno kaj Graz. En dua ekskurso tra Aŭstrio ni vizitis Salzburg, Linz kaj ceterajn vidindaĵojn en Aŭstrio. En la jaro 1992 ni vizitis tombon de nia instruisto de nacioj J. A. Komenský en Naarden.



Dufoje ni vizitis Svisujon, Parizon, Belgion. Niaj programoj estis riĉaj. Tio estis finfine nur la gravaj punktoj de nia laboro. Nun ni maljunaj ofte devis pro malsano ĉesigi laboron. Kaj niaj junaj

anstataŭantoj? Por ili estas la ĉefa laboro organizi kaj plibonigi la SET-on. Mi devas danki al ili.

Sed mi ne povas forgesi. Ĉijare ni festis 20jaran renkonton de estintaj tendaranoj, kiu okazis ĉiam post la 3-a etapo de SET. Mi ne scias, ĉu mi ion ne forgesis.

Kaj nuna situacio de la klubo!

En pasinteco havis la klubo 5 honorajn membrojn. La unua estis Theodor Kilian, la dua Pavel Sittauer, poste František Sedláček, Dr. Vladimír Herman, Lád'a Bala kaj kiel sesan ni proponas dr. Kamila Bártlová. Ĝis nun vivas P. Sittauer kaj K. Bártlová, kiu oficiale minimume 20 jarojn gvidis E-rondeton en lernejo en Okříšky kaj prizorgis esperantlingvan version de la oficiala retejo de la komunumo. La klubo havis 19 membrojn, kiuj subtenis ĈEA-n per mono kaj fariĝis ĝiaj dumvivaj membroj. De ili vivas ĝis nun 12 membroj. Nuna komitato de EK estas 5-persona. Estro de la klubo fariĝis antaŭ 5 jaroj ing. Tomáš Lacina. La oficiala adreso de la klubo: Riegrova 62, 674 01 Třebíč. La komitato decidis vendi la kluban domon ĉe strato de Esperantistoj, por ke oni povu per financoj ripari nian SET-on. Ĝis nun estis moderne riparita la kuirejo, per novaj litoj estis ekipitaj kabanoj ktp.



Pavel Sittauer, membro de la komitato

Kongreso de KELI

En la tagoj de la 7-a ĝis la 14-a de aŭgusto okazis kongreso de KELI en la saksa Zeblico (Zöblitz). Ĉeestis 26 personoj el 8 landoj.



Programo estis ordinara: prelegoj pri diversaj temoj, komuna babilado, kantado kaj preĝoj, esperanta-germana diservo en loka paroĥejo, tuttaga ekskurso en Dresdeno kun ŝipveturo sur Elbo, duontaga ekskurso en la speciala muzeo pri Gottfried Reichel kaj liaj lignaj skulptaĵoj. Reston de la tago ni travivis en la bela naturo.



Tempo pasis en la amika etoso. Ĝojigan surprizon preparis al ni pastro Albrecht Kronenberger. Li, unu el tri aŭtoroj de ekumena diserva libro

ADORU, mem preparis novan kanton de kristanaj kaj nereligiaj kantoj KANTU, kaj donacis ĝin al ni. Jen preskaŭ 400 novaj kantoj!



Venontan jaron estos kongreso komuna por KELI kaj IKUE en Poděbrady.

Aliĝilon oni povas peti ĉe Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady,

polnickypavel@seznam.cz

tel. 723 672 335.



Bonvenaj estas ankaŭ ĉiuj, kiuj ne estas KELI-anoj nek IKUE-anoj, sed volas travivi kun amikoj belan semajnon en la ĉarma banurbo.

*V. Pospíšil
teksto kaj fotoj*

EL NIA HISTORIO

En 1951 estis ĉesigita gazeto Esperantista kaj en septembro 1952 post tutenokta ekscita traktado la ĉeĥoslovakaj esperantistoj cedis al la premo de komunistoj kaj likvidis sian tutŝtatan organizon. Sed tiam transprenis aktivecon la junularo. La redaktoro de la junulara cirkulero Tagiĝo Jaroslav Kuzník en n-ro 33/1956 priskribis la malfacilajn komencojn.

Referato de redaktoro



Unue mi dezirus kelkvorte ripeti la historion de nia modesta cirkulero kaj pri ĝia utileco en nia junulara E-movado.

En jaro 1950 dum monato junio naskiĝis en Opava unua eta, unufolia ĉeĥa cirkulero "Informační list", kiu servis kiel varbilo, entuziasmigilo kaj informilo de komenciĝantaj s-anoj kaj E-kursanoj el Opava.

Tio okazis en tempo kiam kreiĝis la junulara Esp.grupo en Ostrava kaj post kies ekzemplo komenciĝis pli malpli malrapida kreado de junularaj grupoj en aliaj lokoj de nia respubliko.

Kaj jen montriĝis la bezono iel komuniki la spertojn de la unuopaj grupoj al la ceteraj, ekestis bezono de iaj rimedoj kiel entuziasmigi unu la alian en la lokaj grupoj, kaj por tiu ĉi celo estis en kelkaj regionoj komencita eldonado de junularaj modestaj multobligitaj cirkuleroj.

Inter tiuj cirkuleroj kiel la plej frue eldonata estis en Opava la supre jam notita "Informační list", kiu post la

tempo fariĝis simple cirkulero sen ia nomo, sed jam dissendata al multaj grupoj en nia lando, skribita parte ĉeĥe, parte esperante. De monato al monato la eldonantoj en Opava plilarĝigadis la enhavon de cirkulero, kaj kiam montriĝis, ke tiu jam iom helpas al pli multaj grupoj, estis decidite doni al ĝi ian nomon - kaj tiel naskiĝis "Junularo agu!", kiu jam havis sian certan difinon, apartenanta speciale por junularaj grupoj, jam preskaŭ sole skribita en Esperanto, enhavanta artikolojn fervorigajn, senĉese batalantaj por pli kaj pli intensigi kaj plivigli la junularan movadon.

Multobligita cirkulero jam estis eĉ 16-18 paĝa, eldonata regule monate, eĉ dum la plej malfavoraj tempoj de likvido de EAĈSR (Asocio), dum likvido de E-klubo kaj timemo de pli aĝaj s-anoj eĉ publike konfesi, ke ili estis esperantistoj.

Ni diru, ke la eldonado de cirkulero okazis tute sen leĝa permeso, tamen la bezono de ia ligilo inter la gesamideanoj postulis jam eldonon de ia centra junulara cirkulero.

Pro soldatservo de la redaktoro estis la cirkulero fine de la jaro 1951 kun sama nomo transdonita por eldonado al Gottwaldov (nuna Zlín), kie ĝi ricevis la plaĉan veston, bele aranĝita, kun pentraĵoj kaj interesa legaĵo.

Sed nur du monatojn eltenis s-anoj el Opava ne eldonadi ian cirkuleron kaj tial ili decidis eldonadi novan cirkuleron por Ostrava regiono. Tiel naskiĝis nova, vere denove modesta multobligita cirkulero kun nomo "TAGIĜO" kaj la unua numero estis eldonita en januaro 1952.

Samtempe estis eldonata "Jun. agu." en Gottwaldov, kiu tamen post unujara aperado tie, pro foriro de s-anoj Němec kaj Vítovský, ĉesis aperadi.

Tagiĝo fariĝis organo de Esp. Junularo en ĈSR. S-ano Novobilský redaktis ĝin ĝis mi revenis novembre en jaro 1953 kaj denove mi transprenis ĝian eldonadon. Tagiĝo poste iom post iom vestiĝis en pli belan aspekton malgraŭ ĉiam multobligata kaj enhavanta multajn erarojn. Tamen nia junularo jam havis en ĝi sian gvidanton kaj helpanton en la poresperanta laboro. Kun Tagiĝo komencis kunlabori pliaj s-anoj kaj tiel la enhavo iom post iom pliboniĝis.

Post elekto de s-ano Mařík kiel ĉefdelegito de E-Junularo en nia lando, aperis aŭtune en jaro 1955 Tagiĝo jam presita sur rotaprinto kaj estis forsendata al preskaŭ 600 s-anoj, el kiuj estis preskaŭ 100 fremdlandaj. Ĝiaj plej viglaj kaj plej bonaj kunlaborantoj fariĝis s-ano Novobilský laŭ literatura, kultura kaj konkursa enhavo kaj s-ano Mařík kiel ĈD, kiel atribuantoj de diversaj raportoj pri la junulara kaj tutmonda E-movado. Diversspeca, riĉa enhavo, kelkfoja plaĉa eldono de Tagiĝo, jam pli altnivela - fariĝis Tagiĝo ŝatata legaĵo de niaj gesamideanoj.

En nuna tempo ekestas diversaj nesolveblaj problemoj kun ĝia plua eldonado en jaro 1957, tial estas decidite peti la post nelonga tempo starigotan novan Esp. Asocion en nia lando, kiu rajtos eldonadi presitan Esperanto organon, dediĉi en ĝi al junularo en nia lando almenaŭ 3 paĝojn, kiujn iu el junulara sekcio sendepende redaktus.

Jen vi aŭdis en mallonga skizo pri nia Tagiĝo, kaj por mi restas nenio plia ol el ĉi tiu loko sincere danki al ĉiuj helpantoj de ĝia eldonado kaj al ĉiuj kontribuantoj de la sufiĉe bonkvalita kaj interesa enhavo de Tagiĝo. Mi dankas al ĉiuj legantoj kiuj helpis per kia ajn kritiko

plibonigi ĝin kaj mi esperas, ke malgraŭ tio, ke la cirkulero de post nova jaro jam ne aperados kiel memstara cirkulero, tamen ni ĉiuj batalos por tio, ke ni povu havi ankaŭ plue nian sekciajn junularan aldono de centra gazeto kaj ke ankaŭ tiu aldono donos al nia s-anaro sufiĉe fortan volon kaj entuziasmon labori en nia junulara, vere speciala laboro, sen kiu niaj grupoj ne povus bone prosperi.

Permesu al mi ĉi tie en nomo de vi ĉiuj danki al s-ano Novobilský por lia rara kunlaboro kaj samtempe por ĝia oferemo transdoni al li kiel rememoron la libron de J. Baghy romanon "Hura!". Al s-ano Mařík mi ankaŭ esprimas miajn senfinajn dankojn.



Nia junulara movado devas iri man' en mano kun la agado de ceteraj esperantistoj, sed ĝi devas konservi ĉiujn trajtojn kiujn ĝi elkreis dum la tuta pasinta periodo de ĝia esto.

Mi deziras tial al nia laboro pliajn sukcesojn.

Teo kaj Amo

Dimanĉe la 23-an de julio 2017 posttagmeze (15:00 – 17:00) en la 102a UK en Seulo, Sud-Koreio, okazis programo *Teo kaj Amo*. Al la programo, kiu estas projekto ne nur de la organizantoj, sed kampanjo de la tuta Esperantujo, ĉeestis pli ol 150 kongresanoj el Azio, Eŭropo, Ameriko kaj Oceanio.

Estraranoj de UEA s-ro Lee Jungkee kaj s-ino Maria Rosari Spanò ĉeestis la programon kaj donis invitilojn al premiitoj kaj senditoj al oktobra filmfestivalo *Teo kaj Amo* kaj donis al la sukcesintoj Teon Zamenhof, ofertatan de Pekina Esperanto-Asocio kaj ĉina teo-kompanio Haozhan, memore al nia Majstro.

Estis elektitaj tri senditoj el tri landoj, kiuj estis speciale invititaj al la 2-a Filmfestivalo de Mallongaj Filmoj en Esperanto 2017.

1. Olga Ŝiljajeva, rusa esperantisto, partoprenis du konkursojn *Teo kaj Amo*, reklamis konkurson al la rusa publiko, inter 79 konkursaĵoj de la dua konkurso 24 estis rusaj, tradukis 23 filmetojn de rusa lingvo al Esperanto, prelegis kaj verkis artikolojn por Teo kaj Amo.

2. Pavol Kaščák, slovakia esperantisto, kaj **Rostislav Čubok**, ĉeĥa esperantisto, partoprenis du konkursojn, reklamis ilin per prelegoj, fotoekspozicioj ktp., ankaŭ aranĝis programojn de ĉina karavano *Teo kaj Amo* en Ĉeĥio kaj Slovakio dum la Nitra UK, muntis kaj aldonis subtekstojn por 21 konkursaĵoj de la dua konkurso. La mirinda laboro estas, ke septembre en urba biblioteko ili komencos kursojn de Esperanto kunlabore kun la urbodomo de Nový Jičín.

3. Sepa kaj Asorti el Litovio, partoprenis du konkursojn, verkis la teman

kanton de la konkurso *Teo kaj Amo, la kolor' de la mondo* (nun la kanto popularas), lastjare aranĝis abundajn kulturajn programojn de ĉina karavano *Teo kaj Amo* en Litovio kaj bone reklamis nian lingvon per filmeto kaj per muziko al la litova publiko.



La menciitaj estraranoj donis Teon Zamenhof kaj inviton al la 2-a Filmfestivalo 2017 ankaŭ al la premiitoj de la 2-a Filmkonkurso 2017: S-ino **Ilia Sumilfia Dewi** el **Indonezia Esperanto-Asocio**, kies filmeto *Amo, Teo kaj Familio* estas indikita por la premioj *Plej bona filmo* kaj *Plej bona scenaristo*. S-ro **Nan Youli**, reprezentanto de **Tianjin-a Esperanto-Asocio**, kies filmeto *Teo ligas avon kaj nepon* gajnis la *Premion de la publiko*. S-ro **François Randin**, svisa esperantisto, kies filmeto *Tetaso amas vojaĝi* gajnis la *Premion de la publiko* kaj estas la indikita por la premioj *Plej bona scenaristo* kaj *Plej bona kameraisto*, kaj kies filmeto *Amika Invito* gajnis la *Premion de la publiko*. S-ro **TRAN THI HOAN (Ĝojo)** el **Vjetnama Esperantista Junulara Organizo**, kies filmeto *La sekreto de amo* estas indikita por la premioj *Plej bona scenaristo* kaj *Plej bona ĉefaktorino*. S-ro **Didier Loison**, reprezentanto de **gesinjoroj Florent Salzard kaj Chantal Beaumont** el **Francio**, kies filmeto *Magia teo* estis indikita por la premioj *Plej*

bona desegnofilmo kaj *Plej bona muntisto*. S-ino **Dagmar Martinková** (nia ĉi-jara kongresa salutanto), **reprezentanto de premiitoj Pavol Kaščák kaj Rostislav Čubok**, kies filmeto *Patrino* gajnis la *Premion de la publiko* kaj estas indikita por la premioj *Plej bona reĝisoro*, *Plej bona ĉefaktorino* kaj por speciala premio *Internacia kunlaboro*. S-ro **Kook Keun-seop** el **Sud-Koreio**, kies filmeto *Teo, Amo kaj Sincerplena Danco* estas indikita por la premioj *Plej bona kameraisto* kaj *Plej bona originala muziko*.

Verda flago de Teo kaj Amo estis transdonita de Seulo al Svitavy.

La urboj Nový Jičín kaj Svitavy estis honorigitaj per la nomo **urboj de Teo kaj Amo**. Tiukaze la urbodomo de Nový Jičín honoris la projekton de *Teo kaj Amo* per oficiala urba diplomo kaj esprimis dankon al organizantoj de fotoekspozicio *Ĉinio - teo kaj amo*. La ekspozicion persone malfermis la 18-an de julio 2016 dum la vernisaĝo ĉinaj amikoj de karavano *Teo kaj Amo*, kune kun vicurbestro de Nový Jičín kaj direktorino de la *Turisma centro de la urbo*. Vernisaĝon de la fotoekspozicio ĉeestis preskaŭ 80 personoj (**ĉinaj amikoj kaj neesperantistoj de la urbo**). Bedaŭrinde neniu esperantisto vizitis la fotoekspozicion, kiu estis instalita rekte en la centro de la urbo inter la 18-a de julio kaj la 31-a de aŭgusto 2016.

Post sukcesa ekspozicio okazis denove laŭ peto de la urbodomo filma prelego *Ĉinio – teo kaj amo* en la urba biblioteko, kiun ĉeestis denove nur neesperantistoj. Sed ne gravas, ĉar denove venis ĉirkaŭ 60 personoj. Dum la prelego kelkaj homoj demandis nin pri ebleco,

kie ili povas eklerni Esperanton. La direktorino de biblioteko ofertis al ni la lokon, kie senpage ni povos gvidi la kurson de Esperanto. Tiel ekde septembro 2017 en la urba biblioteko okazos la kurso de Esperanto subtenata de la urbodomo Nový Jičín kunlabore kun la nova Esperanta klubo Vanaivan en Kopřivnice. Al la kurso ĝis nun aliĝis 15 personoj. Kurson de Esperanto per rekta metodo gvidos Pavol Kaščák kaj Magdalena Fejfičová el Slovakio.

La nova prelego pri Ĉinio kaj Esperanto okazos en novembro 2017, en la Kulturdomo de Studénka. Ankaŭ ili havas intereson pri kurso de Esperanto.

La urbestro de la urbo Svitavy sendis al la projekto de Teo kaj Amo memsubskribitan saluton.

Ambaŭ originaj dokumentoj de la urboj Nový Jičín kaj Svitavy Pavol Kaščák kaj Rostislav Čubok persone transdonos al la organizantoj de la Filmfestivalo dum Premidona ceremonio en Ĉinio. Ĉar ili partoprenos Filmfestivalon en Ĉinio ekde la 13-an de oktobro ĝis 28-an de oktobro en la urboj Pekino, Ŝanhajo, Zijengjang, Hangzhou kaj Huzou.



La dokumentoj aperos en la nova libro *TEO kaj AMO*, kiun eldonos Ĉina Radio Internacia en la fino de la jaro 2017.

Sukceson al la legantoj de Starto!

Pavol Kaščák kaj Zhang Ping (Ĝoja)

Ferioj en Muzeo de Esperanto

Komence de ferioj venis al Svitavy 20-jara esperantisto Donovan Downes el la kanada Ottawa, kiu partoprenis studan staĝon en Germanio. De la infanaĝo li studas fremdajn lingvojn ne nur en lernejo, sed ankaŭ ĉe la retejo Duolingo. Li scias angle, france, germane, itale kaj Esperante. Li uzis Pasportan Servon kaj vizitis la urbojn Brno kaj Svitavy. Tra Svitavy akompanis lin Marie Minářová kaj Ing. Ján Bobrik, klubanoj de Esperanto-Amikoj en Svitavy.



Ili konatigis lin kun nova ekspozicio „Homo kontraŭ Babelo“ kaj kun historioj de la urbo kaj de la muzeo. Donovan estis invitita por babili kun lernantoj de la elementa lernejo en la strato Riegrova. La lernantoj dum unu horo donis al li demandojn de ĉiaj

specoj. Li volonte ĉion respondis kaj certe vekis intereson de la lernantoj.

Nelonge post Donovan venis vizite al Svitavy por pluraj tagoj hungara esperantisto Thomas Halasz. Ĉar li studis en Ĉeĥio, li ĉion mem aranĝis. Li diskutis kun la klubanoj kaj ĉeestis kurson de Esperanto. Li ne estis en Svitavy la unuan fojon kaj ni esperas, ke ne lastfoje.

Fine de julio pasigis kelkajn tagojn en Svitavy ankaŭ esperantisto Shayash Ayache, kiu vivas alterne en la hispana Granado kaj en Parizo. Ankaŭ Shayah nin vizitis jam la duan fojon kaj ĉion bone memoris. Ĉar li scias 6 lingvojn, li ne havas problemon interkompreniĝi ĉie ajn. Li laboris kiel reĝisoro de mallongaj filmoj, nun li preparas tutvesperan kaj okupiĝas pri natura medicino.



Lunde la 21-an de aŭgusto alveturis buso de esperantistoj el la pola Duszniki-Zdrój, kie okazis internacia renkontiĝo. Pri la seminario sekvas raporto de Libuše Filipová, pri la vizito fotoj de Matěj Nárožný.

Libuše Dvořáková

Seminario en DUSZNIKI

Mi instruis en la pola banurbeto DUSZNIKI. Ni estis 44 homoj, du ĉeĥoj (mi kaj Pavel Jačka), du slovakoj (Pavol Petrík kaj Magdalena Feifičová), Peter Brems el Nederlando kaj unu germanino, kiu estis priŝtelita jam en la stacidomo de Poznano. Ni kolektis monon por ŝi, kion ĉiu povis doni, tamen ĉe la fino ŝi deklaris, ke ŝi devos forvojaĝi hejmen sur balailo. Mi ne scias, kiel ŝia kazo finiĝis.

Min mem oni devis transporti al la seminariejo per aŭto, piede mi ne kapablus tien veni.

Unu polino prezentis monologon pri Zamenhof en la pola lingvo. Okazis pluraj koncertoj, ankaŭ en la proksima parko kaj en la domo de Ŝopeno, kie muzikis pianisto el Ĉikago, kiu koncertas tra la tuta mondo.

La lingvon ni ekzercis sur la korto ĉe muziko, proksimume unu horon. Multaj homoj tie ankaŭ preĝis en la klostra preĝejo, kantis novajn kantojn kaj donis al mi demandojn, kiuj mi ne sciis respondi. Kiam mi demandis, kio al ili plaĉis, ili respondis ke ĉio, tamen plej multe ludoj por ekzercado de akuzativo. Dum instruado ni ankaŭ ludis teatraĵon, ili estis talentaj aktoroj.

En radiostacio Brno ni aŭdis la 27-an de julio informon, ke la unua Esperanto-rondeto en Brno estis fondita jam en 1901, aperis lernolibro, la lingvo havas centojn da uzantoj kaj ke estas bone, ke tia afero ekzistas.

Libuše Filipová

fotis Matěj Nárožný →

Vizito en Svitavy

La partoprenantoj de la seminario en Duszniki-Zdrój, kiun aranĝis Teresa Pomorska, vizitis la 21-an de aŭgusto 2017 nian muzeon en Svitavy, antaŭe ili rigardis kastelon en Nové Hrady, poste veturis al Litomyšl. Pri la vizito ni proponas mallongan filmon:



Cent fabeloj

En Rondeto de D-ro Hradil ni kolektis 100 fabelojn el diversaj lokoj el la mondo en Esperanto. La fabeloj estas el libreto de Teodoro Kilian – LMR – La Mondo Rakontas kaj el diversaj fontoj kaj ankaŭ verkitaj de ni.

La fabeloj estas spegule lokitaj en Esperanto kaj en la ĉeĥa lingvo.

Se vi deziras ricevadi regule po unu, ni volonte sendados ilin al vi rete.

*Jindřiška Drahotová
Blanka Hužerová*

drahotovaesperanto@seznam.cz
blanka.huzerova@post.cz


Somerajn rakontojn

dissendas al interesatoj ankaŭ Tomáš Břicháček t.brighacek@seznam.cz

Ili verŝajne aperos en Praga Bulteno.

Diplomo

de la urbestro el Nový Jičín dr. Jaroslav Dvořák kaj sekretario Mgr. Jarmila Absolonová al la kreintoj de filmeto, kiu reprezentis Ĉeĥion en Ĉinio en la film-konkurso **Teo kaj Amo**. Unu el la filmetoj estis filmita en la urbo Nový Jičín, tial la urbodomo esprimis sian dankon.



70-a kongreso de IFEF



okazos en la pola Wrocław inter la tagoj **19-a ĝis 25-a de majo 2018**.

Aliĝilo kun detalaj infomoj estas elŝutebla ĉe:

<http://ifef.free.fr/Wroclavo2018/Wroclavo2018-IFEF-alighilo.pdf>

Aŭ vi povas skribi al adreso:

**Silesia Esperanto Asocio str.
Kościuszki 35 B/E PL 50-011 Wrocław**

Junularaj projektoj

Slovaka Esperanto-Junularo partoprenas en du projektoj Erasmus. Unu el ili estis *AEJK – Afrik-Eŭropa Junulara Kapabligo*. La projekto ebligis organizi unuafoje la Internacian Junularan Kongreson en Afriko kaj ligi kunlaboron inter la gejunuloj afrikaj kaj eŭropaj.

Ĉeĥa Esperanto-Junularo subskribis kontrakton de Erasmus-projekto pri volontula instruado de fremdaj lingvoj.

Preparata estas tria projekto pri efika kunlaboro inter junularaj organizoj.

Laŭ Léon Kamenický

Jubileoj

En aŭtuno 2017 festas siajn naskiĝtagojn jenaj samideanoj:

Karel Čada, Žamberk
František Dadák, Hranice
Jana Kopecká, Duchcov
František Liška, Šumperk
Eva Nedomová, Černošice
Josef Novák, Jablonec n/Nisou
Marie Opplerová, Ostrava-Poruba
Ing. Klement Pustějovský, Hukvaldy
Emilie Rybáčková, Opava
Anna Vlková,
RNDr František Wohlmuth, Ostrov n/O

Plie ni eksciis, ke iama aktiva membrino, instruistino Marie Bednářová el Palkovice, ĝisvivis ĉi-jare cent jarojn.

LA ELDONEJO KAVA-PECH JUBILEAS



La unuan kajeron kun sia ISBN (Internacia Norma Libra Numero) aperigis KAVA-PECH antaŭ kvaronjarcento, fine de oktobro 1992.

Dume ĝi eldonis pli ol 190 librojn, el tio pli ol 80 en Esperanto. Kaj ankaŭ danke al la Esperanto-eldonaĵoj en 2016 ĝi estis enskribita en la *Ĉeĥa libro de rekordoj* kiel la ĉeĥa eldonejo eksportanta librojn al plej multe da landoj de la mondo.

Tiun ĉi jubileon ni volas modeste soleni kunlabore kun la Unio de ĉeĥaj interpretistoj kaj tradukistoj en ĝia sidejo, Senovážné placo 23 en Prago la 13-an de novembro (lundo) ekde la 16-a horo. Dum la solenaĵo estos lanĉitaj du novaj vortaroj, nome la 4-a eldono de *Slovaka-ĉeĥa kaj ĉeĥa-slovaka vortaro por vojaĝantoj* de Vladimír Němec kaj Magdalena Feifičová kaj *Granda Esperanta-Ĉeĥa Vortaro* de Miroslav Malovec.

Krome estos tie aĉetebraj ankaŭ aliaj eldonaĵoj de KAVA-PECH kun sentebraj porokazaj rabatoj. Mi do invitas ĉiujn amantojn de literaturo, precipe de tiu en Esperanto, veni kaj tosti kun ni je daŭrigo de nia eldona agado.

Petro Chrdle, KAVA-PECH
www.kava-pech.cz

PRELEGOJ DE PETRO CHRDLA EN AŬTUNO 2017

* **L. L. Zamenhof: De Esperanto tra hilelismo al homaranismo**

5. 10. 2017 ekde 17:00 en la klubejo de [Esperantista Klubo](#), Ve Smečkách 25, Praha 1 - esperantlingve, kun projekciado ĉeĥlingva

* **Seznámení s esperantem - 10. 10.** ekde 15:30 en Centrum [Elpida](#), Na Strži 40, Praha 4

* **Přednáška o F.V. Lorencovi v jeho rodišti - 13. 10.** ekde 16:00 en [Hostinec U Bucků](#), Havlíčkova 24, Vrdy - Zbyslav

* **Komenský a Zamenhof** – Paralely jejich životních misí

7. 11. 2017 ekde 18:00 en la klubejo de [Unitárie](#), Anenská 5, Praha 1

La prelegoj estos ligitaj kun prezento de la libroj de KAVA-PECH.

Du belaj sunaj tagoj dum somero de avulinoj ĉe Avulino en Skokovy.

La 46-a lingva seminario kun ebleco mankrei belaĵojn okazis de 7-a ĝis 10-a septembro 2017. Partoprenis 18 fidelaj skokovanoj, kiuj diligente parolis, ekskursis, prelegis, kaj atente prelegojn aŭskultis, promenadis, babilis, ĝojis, gimnastikis, diskutis...



La pinta programero okazis sabate vespere, kiam aktorino Stáňa Hošková rolis reĝinon Eliška Rejčka. La prelegojn preparis Margit Turková, Jana Křížková, Líba Filipová, Jindřiška Drahotová.



Amuzis nin Vlastička Stará per siaj lingvaj spertoj kun usonano. Instruado de nia lingvo okazis en tri grupoj kun tri instruistinoj. Funga sezono havigis al ni bongustaĵojn en penziona manĝejo. Prezentita estis libro, kiun redaktis Margit Turková: *Scházíme se v této knize* (Ni renkontas nin en tiu ĉi libro) kaj freŝa volumo LEGAĴOJ III. de Jindřiška Drahotová. Informon pri ebleco regule ricevadi rete fabelojn el Juna Amiko kaj La Mondo Rakontas de Teodor Kilián en spegula formo esperanta-ĉeĥa vi ricevos ĉe la subskribintino. La fabelojn prilaboradas Blanka Hužerová kaj Jindřiška Drahotová.

Pri la venonta seminario ni informos en marto – eble okazos en majo.



Tombo de Skokova avulino en Všeň


Jindřiška Drahotová
drahotova@esperanto.cz
www.mlboleslav.cz/esperanto
www.evinatelier.cz

La nova kurso LERNU!

estas jam tradukita en la ĉeĥan lingvon el 76%, sed la netradukita parto koncernas tre detalan gramatikon. La kurso mem, kiun verkis Anna Löwenstein kaj kies temo estas scienc-fikcia fantazio pri vojaĝado tra la tempo, jam estas tradukita komplete, do vi povas mem provi aŭ rekomendi al konatoj.

<https://lernu.net/cs>


Teo Zamenhof



Omaĝe al nia Majstro Ĉina Esperanto-Ligo preparis specialan teon kun la nomo Zamenhof.

La beleco de Esperanto kolorigas la vivon de esperantistoj per spirito

de amikeco, paco kaj egaleco diras la plurlingva surskribo.



Miliona Duolingo

Al la Esperanto-kurso Duolingo por angleparolantoj aliĝis jam 1 miliono da kursanoj (la 4-an de septembro 2017) kaj 200 000 da hispanparolantoj.



Kvakeroj en Prago

Inter la 8-a kaj la 10-a septembro, la Kvakera Esperanto-Servo kunveniĝis en la Kvakero sidejo en Prago. Ni estis malgranda grupo sed venis el ses landoj.

Vendrede ni rakontis pri niaj lokaj Kvakero-grupoj, kiuj tre varias, kvankam ĉiuj havas silente bazitan adorkunsidon kaj saman kernan ideon, ke estas iom el Dio – la “lumo” - en ĉiu, kaj ni devas serĉi kaj agnoski tion. (En Afriko kaj aliloke, la Kvakeraj adorkunsidoj pli similas al tiuj de aliaj Kristanaj eklezioj.)

En Prago, la Kvakeroj komencas per 30 minutoj de kantado antaŭ la silente bazita adorkunsido – kiel ni spertis dimanĉe. Post komuna manĝo dimanĉe, unu KES-ano prelegis pri Esperanto kaj ĝiaj kernaj ideoj kiuj tre kongruas kun tiuj de Esperanto. Ĉiuj respondis la plurajn demandojn.

Je la sabato ni traktis jarkunsidon kaj venontajn agadojn kaj diskutis terminojn. Kvankam tre okupitaj, ni haltis por partopreni la Pragan ‘pac-promenon’ dum du horoj ptm gvidata de loka Kvakero, tra placoj kaj stratoj ligitaj al paco laŭnome, aŭ kun la nomo de pac-subtenanto, kun klarigoj pri ties agado. Estis tre taŭga kaj ĝuinda aldono al la semajnfino.

Se vi interesiĝas pri Kvakeroj, vi povos legi pli ĉe la KES retejo, aŭ la retoj de la Angla Hastings retejo, kiu havas kelkajn Esperanto-paĝojn.

La KES retejo : <http://noos.ch/kes>

La Hastings Kvakera retejo : www.hastings-quakers.org.uk/hejmo

Sally Phillips

Letero el Venezuelo

Pasintece nia agado en Venezuelo estis tre granda. Ni havis E-Domon kaj E-Monumenton – la unuan en la lando. Ĉio malaperis pro malamikoj de la Kulturo. Nun apenaŭ ni havas en la urbo la Venezuelan Forumon, kiu malfacile laboras. Ni deziras havi korespond-amikojn en Ĉeĥio. Mi ankaŭ volas lerni la ĉeĥan lingvon. Laŭ via ebleco bonvolu al mi sendi libron/vortaron kun klarigoj franc/anglalingve. Skribu kiom da mono mi sendu. Bonvolu sendi tion rekomendite.

David G. Valecillos V.
Calle 79 № 3C-72

Pquita Sta. Lucía-Mcpio Maracaibo
MARACAIBO -4002 (ZULIA)
VENEZUELA

Mia UEA-kodo: dgva-h
davidakesto@yahoo.com.ve

Ni kondolencas



■ Komence de junio 2017 forpasis s-ino **Eva Hliněnská** (*1935) el Brno, vid-artistino kaj vidvino de pentristo Robert Hliněnský (1908-1979), amikino kaj najbarino de Mgr. Milena Picková (1932-2008), kiun ŝi venigis al Esperanto.

■ La 10a-n de septembro 2017 mortis s-ino **Ludmila Komzáková** el Tábor en la aĝo de 91 jaroj. Inter skoltoj ŝi estis konata sub la nomo **Šlupka**. Al skoltismo kaj Esperanto ŝi dediĉis la tutan vivon.



MARJORIE BOULTON

(1924-2017)

La 30-an de aŭgusto 2017 forpasis d-ino **Marjorie Boulton**. Ŝi naskiĝis la 7-an de majo 1924, doktoriĝis pri literaturscienco en 1948. La postan jaron ŝi lernis Esperanton. Ŝi debutis kiel Esperanta verkisto i.a. en la Belartaj Konkursoj de UEA. En 1958 ŝi estis la unua ricevanto de la Arĝenta Sprono de la eldonejo Koko. Boulton oficis kiel sekretario de Internacia Somera Universitato (1957-1962), de la Internacia Ekzameno (1961-1967) kaj prezidanto de Societo de Britaj Esperanto-Instruistoj (1969). Ekde 1967 ŝi estis membro de la Akademio de Esperanto. En 1998 ŝi ricevis la Esperanto-Kulturpremion de la urbo Aalen, de la FAME-fondaĵo, en 2004 la premion Deguĉi, en 2014 la premion de la Fondaĵo Grabowski. Ekster la Esperantomovado Marjorie Boulton estis vaste konata kiel verkinto de didaktikaj libroj pri literaturo.

La plej gravaj Esperantaj verkoj de Boulton estas **Kontralte** (1955), **Cent ĝojkantoj**, (1957), **Virino ĉe landlimo** (1959), **Eroj kaj aliaj poemoj** (1959), **Zamenhof, aŭtoro de Esperanto** (1962), **Dek du piedetoj** (1964), **Okuloj** (1967), **Nia sango** (1970), **Rimletoj** (1976), **Poeto fajrakora; La verkaro de Julio Baghy** (1983), **Faktoj kaj fantazioj** (1984), **Ne nur leteroj de plum-amikoj** (1984) kaj **Du el** (1985), **Lumo, mallumo kaj kelkaj memoroj** (2005), **Lingva Arto. Jubilea libro omaĝe al Wiliam Auld kaj Marjorie Boulton** (1999). En 1985 ŝi estis elektita kiel Honora Membro de UEA.

Laŭ Gazetaraj komunikoj de UEA

POZVÁNKA NA ČLENSKOU SCHŮZI ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU, z.s. (ČES),

kteřá proběhne v aule
Arcibiskupského gymnázia
v Kroměříži, Pilařova 3, Kroměříž
dne **14. 10. 2017 od 9 hod.**

Program:

1. Zahájení, přivítání hostů, prezentace, kontrola usnášeníschopnosti, volba orgánů členské schůze (3-5-členného předsednictva, zapisovatele a ověřovatelů zápisu)
2. Zpráva o hospodaření ČES
3. Zpráva o činnosti ČES a jejích organizačních složek
4. Diskuze ke zprávám o hospodaření a činnosti ČES
5. Různé
6. Usnesení
7. Závěr

V Bohutíně dne 12. 9. 2017
Bc. Libuše Hýblová
předsedkyně ČES, z. s.

ANTAŮKRISTNASKA RENKONTIĜO (AnkRo)

sabate la 9-an de decembro 2017 en
Písek inter 10-16 h.

Kultura matineo, bunta zamenhofa kaj
kristnaska programo.

Kotizo 100,- CZK, aliĝo ĝis 5.12.

Pavla Dvořáková, 774 942424

pisek@esperanto.cz

www.esperanto.cz/cs/akce/predvanocni-setkani-896.html

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, tel. **723 672 335**, e-mail: polnickypavel@seznam.cz. Předplatné uhradíte na účet u **Equabank, č. ú. 101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.



Monato: 1300,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 780,-Kč

La Gazeto: 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5

La Ondo de Esperanto: nur reta versio 410,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5, reta versio 190 Kč

Literatura Foiro: 1220,- Kč (*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5 (*cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)

Heroldo de E-o - *de la nova jaro estas preparata monata gazeto, detaloj kaj abontarifoj ankoraŭ ne estas konataj. Al interesuloj mi skribos detalojn pli poste!!*

Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
48. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117

Uzávěrka příštího čísla: 15.11.2017

-

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
48-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 15.11.2017

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

KALENDARO

2017-10-06/08

La 12-BIERo en Kopřivnice

e-mentalprago@seznam.cz

2017-10-13/15 ĈEA-Konferenco
en Kroměříž

komitato@esperanto.cz

2017-12-09 AnkRo Písek

pisek@esperanto.cz

2017-12-10 Marcipana Kristnasko

svitavy@esperanto.cz

NAJBARLANDE:

2017-10-29/11-05

Karpata Esperanto-Semajno (KES) en la
banloko Morŝin sude de Lvov - lingvokursoj kaj
ekskursoj

volodomir@ukr.net

2017-11-10/12

Esperantista renkontiĝo GRUPE - 21 en
Gliwice (PL) apud Ostrava

stanislaw.mandrak@gmail.com

2017-11-25

Zamenhof-Festo en Berlino

esperanto@berlin.de

2017-12-02

Zamenhof-Festo en Vieno

aef@esperanto.at

2017-12-08/10 80a GEA-Studsesio en

Herzberg a.H., modulo pri
modulo pri literaturo, historio, movado,
organizado, varbado

esperanto-zentrum@web.de

2017-12-09

Antaŭkristnaska kolbasumado

en Saksio, ementalprago@seznam.cz

2018-01-03/07

La 36-a POLUDNICA en Malaltaj Tatroj,

poludnica83@gmail.com

PLI DA INFORMOJ ĈE

<http://www.esperanto.cz/eo/akce>

kaj www.eventoj.hu/kalendaro.htm



En Skokovy kun aktorino Stáňa Hošková



Ceremonia inaŭguro de Fotoekspozicio Teo kaj Amo en Nový Jičín



Skoltan grupon de geknaboj en Prostějov gvidas Jaroslav Liška



KELI-kongreso en Zöblitz kun ĉeĥa partopreno